

Esperanto kaj Interlingua, 7-a parto  
Radioprelego de Claude GACOND, SRI 716, 1977.06.29 & 07.01 & 02

Cl.- Parolas Claude Gacond. Du kajeroj de la kolekto Studoj de Kultura Centro Esperantista estas dediĉitaj al kompara studo de Esperanto kaj Interlingua. Jen, laŭ ili, ni hodiaŭ raportas al vi pri la ideologio de la novlatinoidistoj, kies skolaroj estas adeptoj de Interlingua:

« Por la novlatinoidoj kaj interalie por la anoj de Interlingua, la umbiliko de la mondo estas Okcidenta Eŭropo, eĉ pli, la novlatinida parto de tiu kontinento. Por la adeptoj de Interlingua ne ekzistas aliaj kulturoj, ol la okcidenta, aŭ, se ili ekzistas, ili estas malgravaj, neglekteblaj, ĉar sen scienco kaj tekniko. Tiuj popoloj, do, ne bezonas internacian planlingvon. Internacia planlingvo estos utila nur al la okcidentaj intelektuloj kaj al la okcidenta elitularo (komerca, scienca, politika). Pro tio planlingvo devas celi kiel eble plej malmulte kontraŭi la eŭropan lingvosenton, tio estas la lingvajn kutimojn de tiu elito; devas baziĝi sur jam ekzistantaj eŭropaj lingvoj, el kiuj ĝi estu iaspeca minimuma komuna denominatoro.

Fakte, tiu elito jam pli-malpli scias unu aŭ plurajn eŭropajn lingvojn, kaj planlingvo povas utiligi tiun fakton, kreante lingvon inter-eŭropan, laŭpove senpere kompreneblan al ĉiu poligloto el-inter la elito.

La scienco, la tekniko, la politiko, la beletra kulturo havis jam komunan lingvon siatempe: la latinan. Multaj latinaj vortoj restis en la ĉefaj lingvoj de Eŭropo. Planlingvo do ne povas ne esti novlatina (aŭ, prefere, novlatinoida) lingvo.

Estas nun klare, ke, se oni konsentas kun tiu eŭrop-centrita preskaŭ novkoloniisma vidpunkto, la konkludoj de la novlatinoida skolo estas logike akceptendaj. Internacia lingvo devas do esti novlatinoida lingvo, tipe okcidenteŭropa, laŭpove senpere komprenebla al la plej multo el jam plurlingvaj – eŭropaj - intelektuloj.

Tiu ideologia konsekvenco kondiĉas la strukturon de la lingvo mem. Kaj la grandaj diskutoj inter la kleraj kolegoj de la novlatinoida skolo temis ĉiam pri problemoj kiel:

«Ĉu en taŭga (novlatinoida) planlingvo la difinita artikolo estu el, aŭ le, aŭ li?»

«Ĉu estas pli nature por novlatinoida lingvoprojekto skribi comercie, commercie, comercio aŭ commercio (per unu au 2 literoj ‘m’)?»

Bizancaj diskutoj, sed tre bone kompreneblaj, se ni konscias pri la ideologia elirpunkto de niaj kunfratoj. Por ili la vortoj estas fetiĉoj, dum la strukturoj estas io jam apriorie decidita: ili estu novlatinoidaj. Iusence, vere filologie interesataj etimologiistoj, kaj ne lingvistoj en la moderna senco de la vorto, estas la kleraj kolegoj de la novlatinoida skolo.

Siatempe soveta lingvisto, sekretario de la Soveta Akademio de Lingvistikaj Sciencoj, profesoro d-ro E. A. Bokarev, asertis, ke laŭ li la disĉiploj de novlatinoidismo tre interesiĝas pri detaloj, kvazaŭ forgesante, ke lingvo finfine devas utili al komunikado, ne al filologia kabineto. Iusence - li aldonis - ili similas al homoj, kiuj diskutas pri aeroplano (aviadilo) ne prijuĝante ĝiajn flugokvalitojn kaj ĝiajn ceterajn teknikajn kaj strukturajn apartaĵojn, sed ĝian similecon al la veraj birdoj!

El ĉio tio ni komprenas, kial la strukturo de Interlingua ne povas esti la sama kiel tiu de Esperanto. Tiuj du strukturoj respondas al du tute malsamaj ideologiaj postuloj, kaj do estas eraro kompari la lingvojn, por decidi, kiu el ili estas supera.»

La venontan semajnon, ĉiam laŭ la propra resumo, kiun faris Edo Bernasconi el sia 170-paĝa eseo pri Esperanto kaj Interlingua, ni diros kelkajn vortojn pri la strukturo de la lingvo de Gode.

Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude Gacond. Ĝis reaŭdo!

---

*Kopirajto © Claude GACOND, [www.esperanto-gacond.ch](http://www.esperanto-gacond.ch)  
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), julio 2012*